Eduardo Vivancos: Esperanta Legendo

“En Esperantujo ni ofte parolas pri junuloj, sed ni ne forgesu la maljunulojn, kiuj konstruis la movadon kaj komunumon, kiujn ni ĝuas hodiaŭ”, skribis antaŭnelonge mia amiko Mateo Chisholm, el Toronto, pri Eduardo Vivancos (foje esperantigita Vivankos). 97-jara Eduardo estis honorita pro elstara agado dum la ferma ceremonio de la UK en Seulo. Naskiĝinta en Barcelono en 1920, Eduardo Vivancos estas esperantisto ekde la 1930-aj jaroj. Li partoprenis la Hispanan Intercivitanan Militon kaj eĉ instruis Esperanton al siaj kamaradoj en la fronto. Eduardo havas mirinde firman memoron kaj senlimajn rakontojn pri la milito kaj la posta ekziliĝo en la koncentrejoj en Francio, antaŭ lia translokiĝo al Toronto en 1954. Mi ekkonis lian vivon dank’ al Javier Alcalde – esperantisto, loĝanta en Barcelono, kiu venis al Kanado ĉi-printempe por fari serion da intervjuoj por la biografio de Eduardo. Javier afable konsentis respondi miajn demandojn!
Intervjuis Ĵenja Amis


Eduardo Vivancos en junaĝo

Ĵ.A.: *Rakontu pri via projekto!*

J.A.: En *La Arto Labori Kune* Humphrey Tonkin klarigas al Mark Fettes, ke li ĉiam klopodas apliki tion, kion li lernis en Esperantujo, en la eksteran mondon kaj ankaŭ male. Tiu frazo frapis min. Mi estas esploristo pri sociaj sciencoj kaj pacaj studoj kaj tiel havas konkretajn talentojn kaj spertojn. Profesie mi intervjuis multajn homojn por malsamaj esplorprojektoj. Ekzemple, mi iniciatis kolekton de longaj filmintervjuoj kun katalunaj pacifistoj, kiu celas konstrui ampleksan memoron de tiu paca movado klarigata de siaj ĉefroluloj. La afero gravas kaj urĝas, ĉar homoj maljuniĝas kaj finfine mortas. Iam mi komprenis, ke indus fari ion similan en nia movado. La biografio de Eduardo enkadriĝas en tiu ideo.

Ĵ.A.: *Kiel vi eksciis pri Eduardo, kaj kiel vi ekhavis la ideon fari lian biografion?*

J.A.: Mi aktivas en vikipediaj rondoj, ĉefe en tiu kataluna. Tie mi verkis centon da biografietoj de esperantistoj. Inter ili, la figuro de Eduardo aparte interesis min. Temis pri barcelonano, kiel mi, kiu travivis la plej dramajn eventojn de nia nuntempa historio. Juna idealisto, li batalis kontraŭ la faŝismo kaj suferis ekziliĝon kaj koncentrejojn. Por la homoj de mia generacio temas pri mitaj okazaĵoj. Ankaŭ mi forte kontraŭas faŝismon. Aliflanke, Eduardo estis atleto, kiu preparis sin por la popolaj Olimpiaj ludoj de Barcelono en 1936, kiam okazis la milita puĉo. Ĉar ankaŭ mi amatore maratonas, jen alia elemento, kiu kunligas nin.

Ĵ.A.: *Kiel vi kontaktis Eduardon, kiel kutime iris viaj renkontiĝoj kun li kaj en kiu lingvo vi parolas kun li?*

J.A.: Unue gravis krei konfidan rilaton kun lia filo Floreal, kiun mi kontaktis pere de helpemaj kanadaj samideanoj. Tiel mi konsciis, ke la ideo de tiu projekto vekis grandan intereson en Eduardo kaj pro tio Floreal varme subtenas ĝin. Li ankaŭ ŝatas, ke mi alproksimiĝas al tiklaj temoj el respektema sinteno. En Toronto mi vizitis Eduardon ĉiutage dum semajno. Laŭ interkonsento, temis pri duhoraj babiladoj matenmeze, ĉiam en Esperanto. Pacience li respondis ĉiujn miajn demandojn. Tio postulis grandan strebon, ĉar mi ofte miksis temojn



kaj epokojn. Vespere mi transskribis la registraĵon, kio pensigis min pri novaj demandoj. Nun ni daŭrigas tiajn konversaciojn telefone. Tre emocie estas laŭtlegi al li malnovan leteron aŭ artikolon, kaj vidi kiel tio spronas liajn memoraĵojn.

Ĵ.A.: *Ĉu estas aliaj esploristoj, kiuj jam pritraktis la vivon de Eduardo?*

J.A.: Neniu laŭ mia scio klopodis verki seriozan biografion pri li. Tamen, li ja estis ŝlosila informa fonto por aliaj biografiaj verkoj, kiel tiuj pri Jaume Grau Casas (vidu *Tagoj kaj Ruinoj*), Germinal Gracia kaj Jozefo Del Amo. Ankaŭ por la *Laboristaj Kronikoj* fare de Antonio Marco Botella. Plurfoje oni petis de li informojn pri la rilato inter Esperanto kaj anarkiismo kaj pri la popolaj Olimpiaj ludoj (ekzemple, brazila televido intervjuis lin tiurilate). Ĉiuj tiuj kunlaboraĵoj, kiujn mi paŝon post paŝo kolektas, multe helpas al mia esploro.

Ĵ.A.: *Ĉu vi ricevis ioman subtenon de iuj organizaĵoj aŭ esperantistoj?*

J.A.: ESF malavare akceptis subvencii mian flugbileton al Kanado. Tiu vizito estis turnopunkto por la esploro, ĉar mi konatiĝis persone kun Eduardo (kaj kun Floreal), kaj plifirmigis nian necesan konfidan rilaton. Ĉiun alian elspezon mi mem pagis.

Ĵ.A.: *Ĉu Eduardo povas bone memori la eventojn de antaŭ sepdeko da jaroj?*

J.A.: Kurioze, li sufiĉe bone memoras la okazaĵojn de antaŭ 70 kaj 80 jaroj, eĉ pli bone ol tion, kio okazis antaŭ 10 aŭ 20 jaroj. Tamen, kompreneble lia memorkapablo ne perfektas kaj mi devas konfirmi ĉiun detalon per pluraj fontoj, inkluzive de historiaj fakaj verkoj, sed ankaŭ de amikoj kaj familianoj kiel lia filo aŭ lia fratino, la gravega SAT-aktivulino Juliette Ternant. Ne malofte, mi uzas tiucele tekstojn verkitajn de Eduardo mem en epokoj pli proksimaj al tiuj okazaĵoj.

Ĵ.A.: *Ĉu konserviĝis aliaj dokumentoj, kiuj atestas pri liaj travivaĵoj – fotoj, leteroj ktp?*

J.A.: Bedaŭrinde, granda parto de lia persona arĥivo perdiĝis en pluraj momentoj, ĉefe kiam Eduardo translokiĝis al la maljunulejo. Bonŝance, Juliette konservas leterojn de li senditajn en la 1930-aj kaj 1940-aj jaroj, kiam li kaj la patro estis en Francio kaj ŝi kaj la patrino ankoraŭ en Barcelono – Parenteze, ankaŭ la historio de ŝia alveno al Francio kiel rifuĝinto estas kortuŝa kaj emociplena – Aldone, multajn interesajn fotojn kaj kelkajn filmetojn mi jam kolektis. Kaj eĉ originalan taglibron verkitan de Eduardo en 1936-37, kiu estas vera juvelo. En ĝi, beletre, freŝe kaj senteme, adoleskanto rakontas pri siaj unuaj travivaĵoj pri amo, Esperanto, milito ktp.



Kontraŭfaŝista E-afiŝo, Hispanio,1936

Ĵ.A.: *Kie vi estas nun en la projekto?*

J.A.: La projekto montriĝis pli ampleksa ol antaŭvidite. Estas multe da fadenoj, kiujn mi ŝatus esplori. Krom Eduardo, mi intervjuis dekon da homoj kaj vizitis UEA- kaj SAT-arĥivojn, interalie. Aldone, esperantistoj kiuj ekkonas la projekton, daŭre kontaktas min por transdoni interesajn materialojn. Kaj ĉar ne ĉiuj internaciaj legantoj scios pri la menciitaj historiaj eventoj, nepras priskribi detale la kuntekston en ĉiu epoko. Resume, serioza biografio postulas multe da tempo kaj mi ne torapidigos la procezon. Tamen, mi decidis eldoni baldaŭ alian publikigaĵon. Temas pri antologio de tekstoj verkitaj de Eduardo, kelkaj el ili malfacile troveblaj.

Ĵ.A.: *Dua libro! Ĉu vi povas diri ion pri la enhavo de tiu antologio?*

J.A.: Kvankam verkitaj en malsamaj epokoj (kaj en malsamaj lingvoj), multaj eroj pritraktas tiujn eventojn, kiuj profunde frapis lin: Olimpiaj ludoj, liberecana revolucio, milito, koncentrejoj... Inter ili elstaras lia taglibro, kiu neniam antaŭe estis eldonita. Li ankaŭ verkis sufiĉe pri la Esperanta movado. Alivorte, liaj tekstoj abundas. Ekzemple, dum 10 jaroj li estis konstanta kunlaboranto de kataluna revuo. Tio signifas, ke malfacilis fari la elekton de la tekstoj. Tiun antologion enkondukos eseo mia, kiu kuntekstigos la tekstojn de Eduardo, kaj kiu helpos al mi konstrui la argumentan linion de lia kompleta biografio.

Ĵ.A.: *Kio estas la plej grava afero, kiun vi lernis de Eduardo?*

J.A.: Sen esti gravulo (t.e. profesoro, sciencisto), Eduardo kapablis efiki ekster Esperantujo. Li funkciigis la internacian lingvon en la liberecana movado kaj tiel helpis konstrui pontojn inter Azio kaj Okcidento. Temas pri stranga kazo de politike konscia homo, sed maldogmema, kiu ŝajnas praktiki la zamenhofan filozofion de *La Vojo*. Post tragikaj travivaĵoj, li sukcese motoris la Esperantan movadon en Toronto dum jardekoj. Tie en 1973 li ĉeforganizis la unuan SAT-kongreson ekster Eŭropo, al kiu laŭ la lokaj aktivuloj ankoraŭ ŝuldas la bona financa situacio de la Toronta klubo. Alice Kazmierowski, kiu ekkonis lin kiel infano antaŭ 60 jaroj, difinas lin kiel la perfektan esperantiston. Kial? Trivorte: espero, obstino kaj pacienco.

Ĵ.A.: *Kiujn sekvojn vi esperas, ke havos via laboro?*

J.A.: Unue, mi celas proksimigi al la publiko sufiĉe malkonatan esperantiston kaj liajn atingojn, kiel la revuo *Senŝtatano*, kiun li fondis kaj


Eduardo Vivancos

redaktoris. Due, mi revenas al la ideo konstrui (kunlabore) la memoron de nia movado klarigata de siaj ĉefroluloj. Jen ekzemplo: post unu el la prelegoj, kiujn mi faris pri tiu esploro, japana samideano alproksimiĝis. Li konfidis al mi, ke mia projekto inspiris lin fari ion similan pri elstara japana esperantisto. Mi ege ŝatus se mia verko spronus tiajn reagojn en aliaj homoj.

Ĵ.A.: *Dankegon pro via tempo! Ĉu vi povus, por la fino, mencii iun anekdoton el la taglibro de Eduardo?*

J.A.: Kiam ekis la milito en Hispanio Eduardo estis 16-jaraĝa, tro juna por lukti en la tranĉeoj. Tamen, li volis helpi en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj decidis iri al hospitalo por doni sangon. Li faris tion kaŝe de siaj gepatroj, ĉar interalie, tiutempe ne klaris, ke oni facile rehavos la sangon donitan. Ankaŭ la maniero doni sangon surprizos la leganton. En tiu epoko, temis pri rekta sistemo: de brako al brako. En sia taglibro, Eduardo kortuŝe priskribas siajn travivaĵojn tiurilate, laŭlitere la senton savi unu vivon, la sinceran brakumon de la familianoj de la vundito post la operacio… dum ekstere daŭras la bombado de Barcelono.

Kotiztabelo de UEA por 2018

La jenaj tarifoj validas ankaŭ por postaj jaroj, se la pago estos farita antaŭ la 30-a de septembro 2018.

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ	PT
Aŭstralio/dolaro	15	37	92	55	33	184	111
Aŭstrio/eŭro	11	26	64	41	25	128	78
Belgio/eŭro	11	26	64	41	25	128	78
Brazilo/eŭro	5	13	32	19	12	64	39
Britio/pundo	10	23	58	38	23	116	69
Ĉeĥio/krono	190	480	1200	765	460	2400	1440
Danio/krono	75	190	475	300	180	950	570
Estonio/eŭro	7	18	45	29	18	90	54
Finnlando/eŭro	11	26	64	41	25	128	78
Francio/eŭro	11	26	64	41	25	128	78
Germanio/eŭro	11	26	64	41	25	128	78
Greklando/eŭro	9	21	51	32	20	102	63
Hispanio/eŭro	11	26	64	41	25	128	78
Hungario/forinto	2100	5200	13000	8300	5000	26000	15600
Irlando/eŭro	11	26	64	41	25	128	78
Islando/eŭro	11	26	64	38	24	128	78
Israelo/eŭro	8	19	47	28	17	94	57
Italio/eŭro	11	26	64	41	25	128	78
Japanio/eno	1350	3400	8500	5100	3100	17000	10200
Kanado/dolaro	15	37	92	55	33	184	111
Kroatio/kunao	45	105	265	170	100	530	315
Latvio/eŭro	7	18	45	29	18	90	54
Litovio/eŭro	7	18	45	29	18	90	54
Nederlando/eŭro	11	26	64	41	25	128	78
Norvegio/krono	96	240	600	360	216	1200	720
Nov-Zelando/dolaro	17	42	105	63	38	210	126
Pollando/zloto	28	70	175	111	67	350	210
Portugalio/eŭro	9	21	51	32	20	102	63
Rusio/eŭro	6	14	35	21	13	70	42
Slovakio/eŭro	7	18	45	29	18	90	54
Slovenio/eŭro	9	21	51	32	20	102	63
Svedio/krono	96	240	600	382	229	1200	720
Svislando/franko	12	30	75	45	27	150	90
Usono/dolaro	13	31	78	47	29	156	93
TARIFO A/eŭro	7	18	45	27	16	90	54
TARIFO B/eŭro	5	13	32	19	12	64	39

ALIAJ	Luksemburgo laŭ Belgio; Kipro kaj Malto laŭ Slovenio.
TARIFO A	Bahamoj, Honkongo, Korea Respubliko, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.
TARIFO B	Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.
MG	Membro kun Gvidlibro plus la revuo *Esperanto* rete.
MJ(-T)	Membro kun Jarlibro plus la revuo *Esperanto* rete kaj, ĝis inkl. 35 jaroj, membreco en TEJO kun *Kontakto* sen plia pago.
MA(-T)	Membro-Abonanto, kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*.
DM(-T)	Dumviva Membro pagas por la tuta vivo en unu fojo 25-oblon de la kotizo MA. Oni ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj, ĝis inkl. 35 jaroj, membrecon en TEJO kun *Kontakto*.
DMJ(-T)	Dumviva Membro kun Jarlibro pagas por la tuta vivo en unu fojo 25-oblon de la kotizo MJ. Oni ricevas la Jarlibron kaj, ĝis inkl. 35 jaroj, membrecon en TEJO kun *Kontakto*.
PT	Patrono de TEJO pagas 3-oblon de la kotizo MJ (ne inkluzivas membrecon). Oni ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO.
SZ	Membro de Societo Zamenhof, aparta societo por financaj apogantoj de UEA (ne inkluzivas membrecon en UEA). La minimuma kotizo estas duoblo de MA.
SA	Simpla Abonanto al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA.
Kto	Abonanto al la revuo *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO.